

Manifesto-de-Parizo_18an-de-decembro-2010

La kunveno pri islamigado de Eŭropo, okazinta en Parizo je la 18a de decembro 2010, estas fondinta ago. Por la unua fojo, oratoroj venintaj el tuta Eŭropo partoprenis saman tribunon por denunci farojn de konkerema islamo tra nia kontinento.

Fine de tiu kunveno, la partioj, organizacioj, asocioj, retejoj kaj blogoj informaj, kiuj apogis la iniciaton, akordiĝis trans siaj malsimilaj pozicioj pri komuna manifesto :

- * Ni kontraŭstaras agreseman prozelitisman de islamo, ĝian okupacion de publikaj lokoj per ritaj preĝadoj islamaj, financadon de ĝiaj kultejoj per publika mono, banaligadon de nutraĵo « islame pura » (« halal »), sorton de virinoj en islamo malan al nia principo pri seksegaleco, kaj pli ĝenerale iun iajn disvolviĝon de islamo en teritorio Eŭropa;

- * Ni reasertas fronte al islamigado de Eŭropo nian nepereeman fidelecon al nia civilizacio plujarmila, al ĝiaj valoroj kaj al ĝiaj tradicioj;

- * Ni instigas ĉiujn popolojn de Eŭropo kaj de la mondo, por ke ili antaŭgardu la estontecon de niaj gefiloj kaj genepoj kontraŭstarante ĉiujn provojn por anstataŭigo de leĝoj de sia lando, fruktoj de sia historio kaj garantioj de sia stabileco socia, per reguloj fremdaj kaj malakodigeblaj kun ili;

- * Ni instigas ilin al defendo de la rajto de eŭropaj civitanoj pri liberaj esprimado, debato kaj voĉdono rilate al la temo;

- * Ni instigas ilin al daŭrigado de iliaj agoj politikaj aŭ artikolaj, por ke ili kontraŭstaru eksplode kreskantajn postulojn de islamo, same kiel ili kontraŭstarus iun ajn totalisman;

- * Ni instigas ilin al malkonsento pri iu ajn sektarismo aŭ pri iu ajn egoisma postulo dum la batalo kontraŭ islamigado, konsiderante ke disiĝo estus krimo kontraŭ popolo kaj patrujo. Ni instigas ĉiun, por ke oni aliĝu laŭ sia sentemo al asocio

aŭ al partio tiel batalantaj kaj kunplektu ligojn inter individuoj, grupoj kaj landoj cele al starigo de fortegaj retoj. Nur tiel ni kapablos reziti al la islama totalismo, kiu malamas inecon kaj samseksemon, kaj kiu celas per minacado kaj demografia kreskado al malaperigo de humanisma civilizacio. Ni rifuzas malklerecon, superstiĉojn kaj blindan submetiĝon de la homo al preceptoj malindaj kaj mortigaj. En tiu tago, ni estas fondintaj liberan asociiĝon de sendependaj organizacioj. Ni konsistigas taĉmenton. Ni havas batalon. Ni hodiaŭ lanĉas movadon de eŭropa rezistado bazitan sur defendo de nia civilizacio kontraŭ nova totalismo.